

LINGVO INTERNACIA

Monata centra organo de la esperantistoj. — 48 paĝoj (13×20)
Jare: 5 fr. (2 sm.)

Administracio:
PRESA ESPERANTISTA SOCIETO
33, LACÉPÈDE PARIS

TUTMONDA ESPERO

Organo de la kataluna esperantistaro

Aperas ĉiunonate en esperanta kaj kataluna lingvoj: kataluna literaturo; enlanda kaj eksterlanda movado; rakontoj, amuzajaj por instruado praktikoj k. t. p.

ABONOJ

Jara abono . . . 3 frankoj (1'20 sm.)
Unu numero . . . 25 ctmoj. (10 sd.)

Specimeno (nenomita numero) estas ricebla po sia valoro.
Ĝiaj mendoj devas esti akompanataj de mono.

Ĝiaj monsendoj estu farataj per germanaj, francaj aŭ hispanaj poŝtmarkoj; per franca, rusa aŭ hispana papermonoj; per internaciaj respondekuponoj da 10. sd. kaj per ĉekoj aŭ transpagiloj de la Ĉelbanko Esperantista.

Abonoj komencas en Januaro, Aprilo, Julio kaj Oktobro. Samaperintajn numerojn oni ricevas nur se ili estas en tenado.

Oni bonvolu skribi legible sur respondekuparkarto, aŭ aldoni respondekuponon al la letero, se oni postulos respondon.

ABONEJOS

Francoj: Librojo de Esperanto, 15, rue Montmartre - Paris

Katalunaj: S-ro J. Suñer kaj k.º, Presafo - Sant Felin de Guixols.

S-ro Rosals - Portaferrisa, 34, librovendisto Barcelona.

S-ro J. Palmerola, P. Major - Vic.

TARIFA POR ANONCOJ

Tuta paĝo. . . 12 frankoj (4'80 sm.)
Duono da paĝo 7 " (2'60 ")
Kvarono . . . 3'50 " (1'40 ")
Okono . . . 2 " (80 sd.)

Anoncoj por peti korrespondanton kostas 10 ctmoj. (4 sd.) ĉiu linio.
Por 3 fojoj rabato . . . 10%
Por 6 " . . . 20%
Por tuta la jaro . . . 40%

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

Tallers, 81 - Barcelono

Pri administraciaj aferoj sin turni al S-ro Administranta

STUDENTO

Unua internacia organo de studentoj
(kun stenografia eldono AORO). Monata

Jara abono, 1 sm. - Specimeno
1 int. resp. kuponon.

Redakcio kaj Administracio:
Ječná ul 24, Praha II. - BOHEMUJO

Unu fojon..
Humorajaro taŝga por la Esperanta lernado, sin amuzante.*
Unu ekzemplaro . . . 0'120 sm. (0'30 fr.)
10 " . . . 1 " 3'50 " "
50 " . . . 4 " 10 " "

Mendojn (kun mono, enĉeksendo) al S-ro Mirkasjo Cases: Salmerón, 229; BARRCELONA - España.

Bazar Esperantista
Specialoos en la mezurero de semizoj por virej. Konfekteioj por sinjorinoj kaj geinfanoj, kravatoj, postukoj, gantoj, parfumo, triketaĵoj kaj vitraj artikoloj.
Puigfabrigar, 2-Banqueres, 18 BARCELONO

TUTMONDA ESPERO



AVIZO ESPERO KATALUNA,
la plej malnova societo esperantista en Katalunlando, kune kun la Redakciejo kaj Administracio de
TUTMONDA ESPERO,
translokigis al strato Tallers, 81

Barcelono, Junio 1910

25 cent.

Abonantoj de TUTMONDA ESPERO

(Daŭrigo)

Ni daŭrigos publikante la nomojn de la novaj abonantoj kaj ni dankos la rimarkojn kiujn oni faros al ni pri eraroj aŭ forgesoj ĉe tiu ĉi listo kaj l' antaŭa publikigita en la aprila numero.

El Barcelono.—Valenti Renom, Josep Astell, Adolf Figuerola, Antoni Semarra, Josep Alemany, Joan Torent, «Grup Supren», J. Vallés, G. Carbonell, B. Anglada, Alfons Sabadell, «Grup Barcelono», «Esperanta Fortuno», Manel Rodriguez, «Ateneu Obrero del Districte 2011», Josep Solá, «Komerca Fako» (Centre Autonomista de Dependents del Comerç), Miquel Travaglia, Joan Farré, Anton Farré, Pere Mercadè, «Grup Kulturo», Enric Adams Tous, Carles de Llanza, Antoni Ribera, Tomás de A. Fullá, Joan Grifols, Maria Roqueta.

El Diversaj Urbetoj kaj Vilagoj.—Pbre. Geroni Gelada (Ridaura. Olot), Joan Crivillers (Vic), Joan Pujol (Tarrasa), P. P. de la Sagrada Familia (Molins de Rey), Joan Solé Granell (Tarragona), Josep Valls (Prat de Lluçanés), «Grup Esperanta Semo», Joan Piferrer (Sabadell), Lluís Aguilà (Sant Esteban de Bas), Anton Bach, Pbre. (Vic), Josep Cabanach (Minas de Bellmunt, Tarragona), Joan Cisa (Premià de Mar), Pradó Subirens (Silges).

El Alilando.—Antono Vječorkjirč (Nikolsk, Rusujo), Max Tesner (Dresden).


Abonats de TUTMONDA ESPERO

(Continuació)

Continuarem publikant els noms dels nous abonats i agraïrem les observacions que sens facin sobre errades o omisions d'aquesta llista i l'anterior publicada en el número d'abril.

MANUFAKTURO DE KOMERCAĴOJ POR VOJAĜI

ONI VENDAS MALALTPREZE



Manuelo Ballespi

Strato Ample, 43-BARCELONA

Eldonisto R. TOBELLA CASTELLTORT, 18, strato Carme, 18 - BARCELONA

★ CLAU ESPERANTO ★

Kataluna Slosilo

100 ekzempleroj (afrankite) . . . 4 franko

POŝVORTARETO

★ Esperanto-Català ★
★ Català-Esperanto ★

Unu ekzemplero (afrankite) . . . 0,75 franko

TUTMONDA ESPERO

Ĉiumonata ilustrita revuo organo de la kataluna esperantistaro

Redakcio kaj Administracio: TALLERS, 81-BARCELONO (Societo «Espero Kataluna»)

3^a Jaro

Barcelono, Junio 1910^a

N-ro 30

ENHAVO.—An els propagandistes desencoratjats.—Amo.—Pri la kapitalo kaj la laboro.—Vintra pejzaĝo.—Testamento bone plenumita.—Helblua estas la stelara nokto.—Figardo.—Enigmo.—Follumante la Gazetaron.—La Sesa Kongreso.—Diversaj soligoj.—Gazetaro esperantista.—Jarlibro de la kataluna Esperantistaro.—Anoncoj.

AN ELS PROPAGANDISTES DESENCORATJATS

L'Esperanto kompta amb nombrosos amics que fan tot lo que poden pera pagar-lo.

Entre aquells que ja han provat de fer propaganda al llur entorn, en la llur ciutat o regió, n'hi ha que, després de molts esforços sense exit immediat, s'han aturat en llur via dient: «Aqui ja no hi ha res a fer.» Es pera aquests que jo he escrit aquestes ratlles.

¿Quins medis han empleat aquests *samideanoj* desgraciats? No m'interessa. ¿Quant temps ha durat llur propaganda? Això m'interessa menys encara.

Baix llur impuls, els diaris locals han publicat articles en pro de l'Esperanto. Prospectes, llibrets, han sigut distribuïts mercès a llurs esforços; han sigut enganxats molts cartells en els murs, etc.

Després, bruscamment, tot s'ha acabat. Perquè 'ls adeptes no venien prou depressa, s'han desencoratjat i han cregut que ja no hi havia res a fer. ¡Grossa errada!

¿Per què s'han retirat de cop i volta? Potser estaven a punt de triomfar. I, encar que no fos aixís, ¿era aquesta una raó pera deturar-se? No, mil voltes no.

Una propaganda pera l'Esperanto, més que pera cap altra cosa, ha d'esser permanent, seguida, i fins diré que *perpetua*.

L'Esperanto té uns grans enemics en els imbecils i en els porucs.

Encara 's troba, que, quan algú parla de l'Esperanto, son interlocutor se 'l mira pensant si aquell és boig; i, quan se fa carrec de que parla seriosament, llavors se 'l mira com original i li té llastima.

El public pera 'l qual l'Esperanto es fet, an el qual l'Esperanto està destinat, és gairebé contrari an aquesta llengua; i tot per idiotisme, per por de ridiculitzar-se estudiant-la.

Vosaltres somniaveu en convertir aquest public a l'Esperanto en un lapsus de temps determinat, cosa impossible, car això vol el treball constant durant molts anys.

Amics llegidors: si vosaltres formeu part d'aquests cansats, coratge i fóra! Torneu a fer propaganda, però de la *perpetua*, no de la passatgera. Si sou debutants, quan aneu per desanimar-vos, penseu que no més amb la perseverancia arribareu a fer penetrar l'Esperanto a l'ànima d'un poble.

AMO

La gloro de la Justulo fandis ilian kiel suno neĝeron, kaj ili, la antikvaj mastroj de la mondo, timigitaj de la ventego sur ili, serĉis per okuloj ploremaj iun rifuĝejon kien kaŝi sin kaj sian honton. La rifuĝejo estis, kaj, dum la gedioj penis savi ĉiu sian plej karan objekton, ĝi oferis al ili sian fidelan internaĵon. Granda skuigo de Olimpo, kolonoj falantaj, tegmento fendigantaj, decidigis la gediojn lasi tiun sanktejon de iutempaj festenadoj. Sinjoro Zeŭso lamis ternante al la rifuĝejo, bela blanka gracia nubeto, kaj tie li eksidis sur unukrura benkaĉo la sola kiun li povis savi de detruo; sinjorino Hero alvenis tre kontenta ĉar ŝi povis savi pomadon per kiu ŝi ŝmiris sian haŭton por ĝin ŝajnigi delikata, kaj Afrodito la petolema kun alia pomado por igi brila la hararon; Neptuno alportis la tridenton; Palas-Ateno armaĵon; Areso tranĉilon; Hefajsto amboson, kaj Hermeso la flugilajn ŝuojn kiujn li estis lasinta sub la lito.

Kiam la denombritaj gedioj, ĉar la aliaj estis malaperintaj, estis de la nubestro lokitaj kiel eble plej bone, tiu ĉi prenis la direktilon kaj la nuboj per gedioj graveda komencis vojaĝadi.

* *

Multon pasis la gedioj en la nuboj vojaĝante. Pasis la tago kaj la nokto, la vintro en neĝa vesto kaj la somero en varmo, la printempo en birda kanto kaj la aŭtuno en velko de folioj, pasis la jaroj kaj la centjaroj, kaj ili vojaĝis.

La eĥo portis al la oreloj de Zeŭso, kiu, malgraŭ la aĝo, estis malplej surda el gedioj, tiajn novaĵojn, ke la espero repreni la gloron, kiu iam venis en lian koron, forigis por ĉiam for de ĝi. La eĥo sciigis al li la morton sur kruco de la Justulo kaj lian reviviĝon, liajn vortojn en amo kaj la multon da piuloj kiuj lin sekvis. Ofte tiuj sciigoj lian vizaĝon malgajigis, sed iun tagon ĝi ŝajnis kvazaŭ animata de flamo interna kaj li ekkriis gaje—malgaje de tempo al tempo.

—Tie estas amo!

La gedioj lin rigardis surprizate, ĉar ili ne lin komprenas; nur la eĥo lin komprenis kaj ĝi eĥis malproksimen:

—Tie estas amo!

* *

La nokto estis dolĉa; la bloveto de la malvarmeta zefiro kvazaŭ rejuniĝis la korpojn maljunajn de la gedioj; ili estis en rondo kie regis silento; neniu parolis: eĉ oni tenis la spiron por ne malutili tiun enpenetron en sin mem.

Hero iutempe orkrona, la fierulino, la unua rompĉis tiun silenton tiel solenan:

—Nu! Edzo—ŝi malgracie elparolis—ĉu ni devas resti ĝis eterne en tiel malbela nubaĉo?

—Foriru se vi povas—senhontis Hermeto.

Grimacis la diino kaj denove la silento regis, tiu silento kiu igis la ko-

rojn kuntiriĝi. La silentaj gedioj vidis la Zeŭsan neĝan kapon leviganta malrapide; liajn okulojn ŝajnantaj esti retrovintaj la fulmojn timigajn, kaj lian pozon enhavanta ion mi nescias kion solenan. Lia buŝo malfermiĝis kaj per voĉo iom tremanta, sed klara, li skandis ĉi tiujn vortojn kiuj sonis grave en la silentado de Naturo:

—Kio plej bona en la mondo?

Tiam estis tremeto kio trakuris la korpojn de la gedioj, tremeto kiu skuis la membrojn malsanajn; sed denove regis silento kiu, tiun ĉi fojon, estis baldaŭ rompata de la mokema voĉo de Hermeso.

—Paĉjo estas lerta—li rikanis al Neptuno.—Ĉu vi rimarkis ke li diris «en la mondo»? Li ne volas meti gediojn en la aferon.

—Sed mi metas ilin—gravis Zeŭso.—Ĉu ni ne estas en la mondo? Mi vin demandas edzino; kio plej bona en ĝi?

—Kio plej bona?—ridaĉis la bovookula.—Edzo, vi ŝercas: la demando estas neutila. Kio pli bona ol mi? Mi, la reĝino de la ĉielo, la ortrona kaj orŝua, senkompare bela diino senmorta, via edzino, mi estas plej bona. Ĉu ne vere?

—Vi nun Afrodito—diris Zeŭso nee balancinte la kapon.

—Kio pli bona ol beleco? Beleco estas kio gajigas korojn; beleco estas tio, kion serĉas gedioj kaj homoj; eĉ bestoj gaje blekas ĉe beleco; belecon enhavas la plej bonaj aĵoj en la mondo: la floroj, la dolĉaj floroj kies kalikojn kisomalfemas Febo blondhara, estas belaj; la blueco en maro sur kiu ŝipiras maltimantoj kaj la verdeco en kampoj kie paŝtiĝas la ŝafoj sub la sono de la fluto paŝtista, estas belaj, kaj, fine, la gedioj kiuj estas super ĉio, ĉi tiuj estas belaj. Ĉu ne beleco plej bona?

—Diru Palaso—diris Zeŭso nee balancinte la kapon.

—Kio pli bona ol saĝeco? Saĝecon havis la plej bonaj homoj, Uliso kaj Telemako, kaj saĝecon havas la plej bonaj gedioj, vi kaj mi: saĝeco estas kio enkondukas ĉion en la vojon al feliĉo, kio konsolas la suferanton en mizero, kio lin nutras per siaj mamoj plenaj de likvoro; aĵo kiu ĉiam vivas kiu neniam mortas estas saĝeco. Ĉu ne plej bona?

—Vi nun Neptuno—diris Zeŭso nee balancinte la kapon.

Neptuno, kiu kuŝis trankvile, levigis rapide kaj movis majeste la tridenton; sed, kiam li volis paroli, li povis nur elmeti raŭkan sonon: li metis la manon sur la kolon, kaj denove falis senenergie.

—Diru Areso—diris Zeŭso.

—Kio pli bona ol milito? Milito ofertas al miaj okuloj sangavidaj la spektaklon de terura buĉado; mi rigardis kun entuziasmo tiujn homojn ankoraŭ varmajn kiuj tremetas en la skuigoj de la agonio, tiujn vulturojn kiuj akre grakas peze flugante ĉirkaŭ super la manĝotaĵo. Tiu spektaklo satigas miajn okulojn kaj gajigas mian koron. Kio pli bona ol milito?

—Vi nun Hefajsto—diris Zeŭso naŭze aŭskultinte la paroladon de Areso.

Hefajsto prenis la amboson kaj, levinte ĝin en la aero, ĝin ĵetis al la alia flanko de la nuboj. Jen estis lia respondo: forteco. Zeŭso ridetis.

—Kaj vi, Majido,—diris li—ĉu vi nenion diras?

—Jes, paĉjo,— rikanis Hermeso— mi ne kuraĝas paroli en tia rondo de saĝuloj.

**

Zeŭso ne lin aŭskultas jam; liaj okuloj ĉielen levigintaj ŝajnas atente rigardadi iun objekton kaj ili brilas kun la fajro en tiuj fulmoj kiuj ŝanceligis alitempe ĉielon kaj teron, gediojn kaj homojn; liaj blankaj haroj kuŝas sur lia dorso kiel la vintra neĝo sur la dorso de monto; lia pozo estas majesta kaj solena, kaj tiuj majesteco kaj soleneco respekti lin igas la diajn gesenhontulojn kiuj lin ĉirkaŭas.

—Edzino,— li parolis la kapon turnante al Hero — reĝino de la ĉielo, ordonu la blankajn nubojn halti kaj la venton ne blovi; ordonu la lunon kaj la stelojn foriĝi for de la kampo blua. Ĉu ili obeas? Ortrona kaj orŝua, kie estas viaj oraj trono kaj ŝuoj? Senkompare bela, kie estas via beleco? Malgrasaj palaj vangoj, okuloj en profundo, lipoj neruĝaj kaj malgraciaj, sendenta buŝo: ĉu ĉi tio beleco? Diino senmorta, kiel vi mortis? Vi estas tie ĉi kien ne alvenas al vi la fumo de la iutempaj bruloferoj, vi estas tie ĉi kaj vi ne povas iri aliloken, ĉar vi mortis: mortis via gloro, mortis via beleco, mortis via potenco, kaj vi kaŝiĝas ombro de Hero, viva mortintino, ĉar via vivo starigas vian morton. Mia edzino nur vi estas, kaj mi kio? Senglora, senpotenca, mi estas nenio; la homoj, antaŭe tremantaj ĉe mia nomo, hodiaŭ ridas ĝin, ĉar mi estas ulo mizera, ĉar mi estas ombro vana, ĉar mi estas malforta kiel la herbo kaj maljuna kiel la kverkoj centjaraj.

Li haltis, kaj en liaj okuloj aperis du larmoj, nur du; sed ili esprimis suferegon dum ili ruliĝis sur la vangoj malgrasaj.

—Beleco!—li daŭrigis post momento— Kie estas beleco en la mondo? Beleco kiu estas en la mondo estas beleco malbela en materiala voluptemo, estas malpura koto kien enteriĝas la animoj, estas la mortigo de la honoro kaj la malhontigo de la amo; beleco kiu gajigas korojn, beleco en floroj, beleco en blua maro, beleco en verdaj kampoj, beleco kiu enigis en la animon la puran freŝan elspiraĵon de la amo; tiu beleco ne estas en la mondo: en ĝi nur estas rebrilo de tiu beleco, kaj tiu beleco estas alte, tre alte: tie kien ne alvenas la rigardoj de la okuloj, tie kien alvenas la rigardoj de la puraj animoj.

—Saĝeco!—daŭrigis Zeŭso Palas-Atenon rigardante.—Ĉu ĝi estas tiu ombro kiun havis enkape kelke malmulte da maljunuloj? Filino, Uliso kaj Telemako ne akceptis vin ĝis iliaj barboj estis neĝaj, mi ne havas saĝecon de kiam vi eliris el mia kapo kaj vi, vi estas ombro sub armaĵo kiu ne brilas, sed rustas. Saĝeco en la mondo ne enkondukas feliĉon, ne konsolas suferanton, ne nutras, ne vivas nek mortas; ĉar saĝeco ne estas en ĝi.

—Areso—daŭrigis la dio ripozinte—via parolado naŭzojn kaŭzis al mi: vi parolas pri mortigoj, vi parolas pri avida rigardado de la homoj en agonio, vi parolas pri milito sangon soifanta, kiam la voĉo de la amo ekresonas en la koroj, kiam la rego de la paco ekas; vi parolas pri vulturoj manĝegontajn kadavrojn, kiam la espero dolĉas al la okuloj de la suferanta homaro.

—Forteco!—li turniĝis al Hefajstro—Forteco en la mondo nur taŭgas

por malutili malfortecon; sed forteco kiu estas en la mondo ne estas forteco: ĝin nur havas tiu kiu direktas la fulmojn de sia ortrono, kiu sonigas la tondrojn en la blovado de la ventego: tiujn fulmojn, tiujn tondrojn kiujn antaŭe mi ĝin apenaŭ kredas, mi direktis kaj sonigis de la trono en Olimpo.

Kaj Zeŭso silentiĝis.

**

Mallaŭta murmuro trakuris la rondon de la gedioj, murmuro kiu pli kaj pli laŭtiĝis kaj kiun klare esprimis la akreforta voĉo de Hermeso:

—Paĉjo, kio, do, estas plej bona?

—Plej bona—solenis Zeŭso—estas tio kion alportis al la mondo la Justulo kiu mortis sur kruco savante la homaron; plej bona estas la semo kiun li dissemis ĝis kaj de sur la lito de marto; ĝi estas kio nin faligis: ĝi estas tiu forto kiu mortigis gloron, kiu detruis Olimpon, kiu antaŭen kuris faligante la barojn; ĝi estas sento kiu, iom dorminte, nun vekigis kaj antaŭen iras alifoje, kies kuradon ne haltigas eĉ iom la muroj de la popoloj nek la montoj, tiuj gigantaj muroj de Naturo; ĝi estas bono, ĝi estas la plej bona aĵo en la mondo; aĵo kiu verŝas balzamon sur la vundojn dolorantajn, kiu konsolas la mizerulon; kiu detruas la malbonon kaj la malbonulon kiu devas kaŝiĝi en la lastaj tranĉeoj for de kiu ili estos forpelataj kiel hundoj; tio ĉi estas plej bona: tiu ĉi sento ĉiam venkanta, ĉiam triumfe antaŭen iranta... Ĝi estas...

—Kio? Kio?—la gedioj scivolemegis.

La fajro en la okuloj Zeŭsaj kreskis, kreskis la soleneco en lia voĉo, kiam li skandis ĉi tiun vorton: —Amo!

**

En tiu momento, ĝuste en tiu momento, melodian murmuron el tero alportis la eĥo, melodian murmuron kiu igis Zeŭson ekkrii:

—Ĉu vi aŭdas? Ĉu vi aŭdas?... Ĉu vi aŭdas la homojn himnantajn al la amo?—Kaj Zeŭso trarigardis de la nubo trueton kiu estis ĉe liaj piedoj.—Rigardu tien, sed rigardu per okuloj plenaj de respekto: rigardu kaj aŭskultu, kaj vi vidos kaj aŭdos la vekigon de la amo sub la faldoj de la verda standardo.

La blankaj radioj de Seleno ĉirkaŭvolvis la gediojn aŭskultantajn.

**

El sub la verda standardo la preĝo altega alvenis al la oreloj de la gedioj portata en la flugiloj facilventaj de la eĥo. Kaj ili aŭskultis atente la versojn de tiu poemo, de tiu poemo belega kiun elnaskis homo, sed kiun inspiris Dio. Ili aŭskultis ankoraŭ, kiam la lastan strofon eĥis la eĥo:

La verdan standardon tre alte ni tenos;
Ĝi signas la bonon kaj belon.
La Forto mistera de l' mondo nin benos,
Kaj nian atingos ni celon.
Ni inter popoloj la murojn detruos,
Kaj ili ekkrakos kaj ili ekbruos
Kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero
Ekregos sur tero.

CEZARO JORDANA.

PRI LA KAPITALO KAJ LA LABORO

(Humoraĵo)

Du sinjoroj renkontas sin meze de strato kaj unu demandas la alian.

— Sinjoro; vi kiu estas tre instruita, bonvolu klarigi al mi tion kion mi ĵus legis en la ĵurnalo.

— Kio estas tio?

— Pri la kapitalo kaj la laboro. Kaj mi ne komprenas kion signifas tiuj ĉi vortoj.

— Ho! (murmuris la alia kun ruza rideto sur la lipoj) tio ĉi estas tre klarebla kaj mi tuj instruos vin pri tio.

— Antaŭan dankon sinjoro; vi ĉiam tre ĝentila kaj...

— Bone, pruntedonu al mi du spesmilojn kaj tute mi klarigos al vi tiun ĉi gravan aferon.

— Tre volonte (respondis la alia, kaj elmetante du spesmilojn el sia monujo pruntedonis ilin al li.)

— Tre bone: nun supozu ke tiuj ĉi du spesmiloj estas la kapitalo, (diris enmetante rapide la monon en sian poŝon.)

— Kaj la laboro? rediris la pruntedoninto.

— La laboro estos por reposedi la monon kiun ĵus vi pruntedonis al mi, kaj salutante lin ĝentile tuj foriris.

La pruntedoninto restis tie surprizplena rigardante tie kien malaperis tiu ruza sinjoro kun sia mono.

J. B.

Membro de «C.A.»

VINTRA PEJZAĜO

La neĝo falas diafaniĝanta kaj ne ĉesas.

Tra la fenestroj kiujn malpie albatas la ventego, gluita tiu infanina vizaĝo al la kristalo de glacita varma vaporo, absorbata en la kadenco de tio eterna, mi vidis ŝin, sen pensi en mia absorbo pri la neĝo kiu estis kovranta min.

Mi eksentis ion kvazaŭ ĉiela anĝelo malsupreniris por revivigi la radikojn de la morto.

Mi malproksimiĝis rapide, kiel rabisto kiu forprenas ion.

Kaj mi daŭris foriranta ĝis lacigita mi eksentis finiĝis la apogo, kaj preskaŭ mismortinta, mi falis sur grandaĵon de la vojo kiu proponis al mi sian rifuĝejon da neĝo! mi fermis la okulojn!

Senfolia abio kiu multajn fojojn estis utila al mi per sia ombro, disŝutis silente siajn velkintajn foliojn, kiuj estis la rifuĝejoj de kelkaj birdetoj...! mi sonĝis! kaj kiam mi vekigis, ektagigis, duberuĝa nubeto etendiĝis sur la altaĵoj... ploris ĉirkaŭ mi la mortinta pejzaĝo pro la degelado de la neĝpecegoj, kaj mi eksentis alveni al miaj okuloj la larmoj.

Kaj la folioj falis, falis naĝantaj sur la neĝaj kavajoj.

ARTURO TORNÉ.

TESTAMENTO BONE PLENUMITA

Vilaĝano trovis sin tre malsana kaj kompreninte ke nur restis por li malmultaj tagoj de vivo, diris al sia edzino, la jenon:

«Kiam mi mortos, vendu mian ĉevalon kaj sendu tion kion pro ĝia vendado, al vi oni donu, al mia familio; vendu ankaŭ la hundon kaj gardu por vi la valoron de tia vendo. Ĵuru al mi ke vi tiel ĝin faros.»

La virino frotis siajn okulojn per sia antaŭtuko, sopiris kaj tion promesis al li. Post tri tagoj ŝi jam estis vidvino.

La sekvantan sabaton, estis foira tago en tiu vilaĝo. Multaj scivolemuloj haltis antaŭ du palisoj starigitaj meze de la vendistarejo.

Apud unu el tiuj palisoj restadis ligita, dikega ĉevalo, kies brila haŭto, kies bela dentaro kaj kies muskoloj bone desegnitaj pruvis ĝian bonan farton, ju-necon kaj fortikecon.

Apud la alia, dormetadis maljuna hundo, devenanta de nekonata raso, tre malgrasega kaj preskaŭ senhara.

De la unua paliso pendadis aŝiŝo kiu diris «Tiun ĉi ĉevalon oni vendas po kvin frankoj;» kaj de la dua, pendadis alia kun la sekvantaj vortoj; «Tiun ĉi hundon oni vendas po kvincent frankoj.»

Antaŭ tiu hundo, la persono, movigis la ŝultrojn. Eble estis freneza tiu kiu petis tiel grandan monsumon pro tia besto!

Sed ili vidinte la ĉevalon miris antaŭ gajno tiel ampleksa.

La vidvino, sidante inter la du palisoj, ŝajnigante grandan indeferentecon, atendadis iun kiu faris al ŝi oferon.

Fine riĉulo de tiu vilaĝo alproksimiĝis al ŝi.

«Ĉu vere vi li liveras tiun ĉi ĉevalon kontraŭ kvin frankoj?»

«Nature. Tie ĉi estas aŝiŝita la prezo kaj mi ne kontraŭdiras tion kion mi mem ordonis aŝiŝi.»

«Tiel, mi ĝin aĉetas.»

«Bone, sed unue vi devas aĉeti la hundon.»

La aĉetanto dorse turniĝis; sed pensante tion pli bone, diris:

«Ĉu vi vendas do, kune la du bestojn po kvincent frankoj?»

«Po kvincent frankoj ne; sed po kvincent kvin kaj ne ankaŭ kune sed disge. Kondiĉe ke kiu aĉetos la hundon po kvincent frankoj akiros la ĉevalon po kvin.»

La vilaĝano iom pripensis; li ne komprenis la intencon de la vidvino; sed ĉar la afero estis bona eliris el kovrilo kvin bankbiletojn, kaj el sia monujo kvin frankojn, pagis kaj forportis tiujn du bestojn.

La vidvino liveris skrupule al la heredantoj de sia edzo la kvin frankojn, valoron de la ĉevalo, kaj gardis por si la kvincent, valoron de la hundo ĉar la lasta volo de la mortinto estas sanktega kaj oni devas plenumi ĝin bone.

J. VENTURA.

«Bi Lumon»

Terrassa, Aprilo 1910^a

— Amiko, kiajn insultojn diris sin reciproke hieraŭ posttagmeze Sinjorino A. kaj Sinjorino B!

— Ĉu ili nomis sin malbelaj?

— Ne.

— Tiel, lasu al mi la taskon repacigi ilin.

(De Unu fojon).

HELBLUA ESTAS LA STELARA NOKTO...

de Aleksandro Petöfi.

Tradukis el hungara KARLO MEZEI

Helblua la estas stelara nokto,
Malfermante estas mia fenestro,
El fenestro mi rigardas ĉielon,
Pripensante mian karan anĝelon.

La stelara ĉiel' kaj mia anĝel'
Sur la tuta mondo estas la plej bel',
Mi almenaŭ la grandan mondon vidis,
Sed pli belegajn mi nenie trovis.

Komencas jam malleviĝi la luno,
Tie ĉe la longe bluanta monto.

La lun' eble mia ĉagreno estas,
Kiu paliĝis, apenaŭ mi vidas.

Alte staras Plejadoj sur ĉielo
Ekparolas kokoj sur regiono,
Matenruĝas; malvarmet' vento venas,
Mian vizaĝon malvarme ventumas.

Mi jam forirus de mia fenestro,
Malleviĝi kaj sonĝi; sed kial do?
Sonĝi mi ne povus tian belaĵon,
Kia bela mi vidas nun la vivon.

RIGARDO

Rigardo similas la sagojn de l' amo,
Ĝi celas l' okulon kaj koron ĝi trafas;
Rigardo, vi estas la floro de l' vivo
Balzamo dolĉiga de l' homa doloro.

Rigarde ni konas, ke vivas aliaj
Kaj ni jam en mondo ne estas soluloj;
Per nura rigardo ekridas la koroj,
Malamo disiĝas laŭ nova pensado.

Rigardo gajecon disŝprucas; sekigas
Ĝi ploron ĉe vango infana kaj vira;
El vivo ĝi faras senfinan vicaron
Da gloraj tagiĝoj kaj brilaj tagfinoj.

Rigardu do rekten libere, amike,
Neniam subkaŝe kliniĝu la frunto!
Rigardo fariĝu la nia Di—gardo!
Rigardu ni rekten, kaj estu gefratoj.

DORNETO.

ENIGMO

Ian tagon saĝa Persano diris al siaj amikoj: Kio estas el ĉiuj objektoj el la mondo la plej longa, la plej mallonga, la plej rapida kaj la plej malrapida, la plej nezorgita kaj la plej bedaŭrita, sen kio nenion oni povas fari, tiu kiu konsumas tion, kio estas malgranda kaj vivigas ĉion, kio estas granda?

Oni diris ke tio estis la riĉeco, aliaj la tero kaj aliaj la lumo.

Sed Zadig'o certigis ke tio estis la Tempo.

Nenio estas pli longa, li aldonis, ĉar ĝi estas la mezuro de l' eterneco.

Nenio estas pli mallonga ĉar ĝi mankas al ĉiuj niaj projektoj.

Nenio estas malpli rapida por tiu, kiu ĝuas, dum ĝi etendiĝas ĝis la senfino ĉe la grandaj objektoj kaj ĝi dividiĝas ĝis la senfino ĉe la malgrandaj.

Ĉiuj homoj ĝin senzorgas kaj ĉiuj bedaŭras la perdon.

Oni faras nenion sen ĝi.

Ĝi foririgas ĉion, kio ne estas inda je la posteularo kaj ĝi senmortecigas ĉion, kio estas bona.

A. MELIS.

Marto, 1910^a.

FOLIUMANTE LA GAZETARON

D-ro Bremon publikigis en la Aprila numero de tiu-ĉi lerta revuo tre gravan artikolon, ne nur pro ĝia enhavo, sed ankaŭ pro ĝia signifo kaj transcendeo. La verkita artikolon mi tute ne intencas kontraŭagi, sed nur fari kelkajn personajn esprimojn pri tio ke li proponis, ne pri la afero kiun li pritraktis.

Li opinias ke, konsilantaro estas afero kiun li volonte akceptas sed ke tiu-ĉi problemo, estos malgraŭ la decido de la Esperantistaro nesolvebla, ĉar la organizado de la diverslandaj societoj estas malperfekta.

Tiel ni devas nur zorgi pri la naciaj societoj, kiuj—li aldonas,— la balotado de konsilantaranoj plirimarkigos la diferencojn kaj malpacojn inter la enlandaj societoj, kaj eĉ naskos novajn disputojn. Kial? — Ĉu ne estas bone difinita la nunan rolon de la enlandaj societoj?—Ĉu oni povas dubi pri la nepra ekzistado de la veraj naciaj societoj, eĉ ebligi la reorganizado de ili se estas necesa?—Kaj mi diris veraj, ĉar kiu havas la plimulton da enlandanoj, tiu estas la vera nacia societo, anstataŭ kiu nur estas tiel, nome. Aliparte mi konstatas ke ĉi-tie, tiu decido farigis la Kataluna-Esperantista Federacio'n, sen malpacojn sen disputojn. Plie oni devas atenti ke la esperantafero fratis la homojn de malsamaj lingvoj, nur tial ke, ili sin komprenas reciproke, ĉu do, Esperanto aŭ pli bone ĝia interna ideo, ne sukcesos en la naciaj societoj, la malpacoj daŭros, konsekvence la plej taŭga celo de Esperantismo estus forpelita de la personpasioj, de la frataj enlandaj esperantistoj!

Li prezentas tri proponojn pri kiuj mi devas rimarki la jenon: Li jesas ke la Esperantistaro, estas la Esperantistoj mem, kiuj devas subteni la Oficialajn Instituciojn de Esperantismo, tio estas vera, kontraŭe la dua ne estas tia. La plej fervoraj esperantistoj ne estas nur tiuj kiuj ĉeestas kongresojn, restas multaj senlacaĵaj esperantistoj kiuj irus tre volonte Kongresojn kaj ili estas devigataj resti hejme pro ilia socia rango, kaj fine mi kredas ke la tuta Esperantistaro estas devigata subteni iom ajn, senpere Oficialajn Instituciojn de Esperantismo. Ĉefe ĉar la Oficialaj Institucioj de Esperantismo devas agi laŭ sia volo, tial ke sia volo, estas la volo de la Esperantistaro, ili devas havi liberan vojon en sia agado, ili mem devas montri al Esperantistoj, la monon kiun ili bezonas, kaj ni saĝe kolekti ĝin.

Plie, laŭ la morala flanko de tiu celo, la Konsilantaro ŝajnas al mi, estas por plene atingi veran sencon de internaciaj, la aferoj koncernantaj al Esperantismo, tiel ni nepre devas akcepti la naciajn elementojn, tiel same, kiel por kompreni la tuton, ni bezonas la parton.

Jen, kion pensigis al mi la lasta artikolo de S-ro Bremon.

A. B.

El Lumon.

Terrasa

— La unuan fojon, kiam vi reforlasos min, Doroteino, mi memnovligos min kontraŭ viaj piedoj.

— Kaj la duan?

(De Unu fojon.)

LA SESA KONGRESO

Bone laboras ĝia Komitato! La S-ro Edwin C. Reed, Ĝenerala Sekretario sendis al ni leteron, al kiu akompanas 11 fadenaj paperfolioj, entenantaj 28 liniojn po ĉiu, maŝine skribitaj.

Antaŭ la neebleco konigi la tutan skribaĵon al nia legantaro, ni kopias tion, kio, laŭ ni, estas plej interesa.

ALVOKO!!!

Por plene montri la utilecon de Esperanto je la Internaciaj Kongresoj estas necese ke kiel eble plej multe diversaj nacioj kaj lokoj estu reprezentataj. Ni devas montri ke kongresanoj el ĉiuj partoj de la mondo povas facile interparoli kaj interkompreniĝi per sole la Internacia Lingvo.

Je la Sesa Kongreso estos ankoraŭ pli necese ke Esperantistoj ĉeestu el kiel eble plej multe diversaj nacioj de Eŭropo, Azio kaj Sud Ameriko, ankaŭ el Kanado, Meksiko, kaj ĉiu stato en Usono. Tio estas superege dezirinda de la Usona Kongreso, ĉar kvankam oni diversloke en Usono uzas ĉiun eŭropan lingvan krom angla, oni faras ĉion kaj veturas ĉien en nia vasta lando, uzante nur la anglan lingvon. Tial la usona publiko ne tiel profunde sentis la bezonon por internacia komunikilo kaj ĝis nun ne devis akcepti Esperanton tiel ĝenerale kiel ĝi estas jam akceptita en multlingvaj regionoj.

Tiaĵi ni petas la Esperantistojn en ĉiu lando, regiono kaj urbo de la mondo, ke ili estu reprezentataj de almenaŭ unu kongresano ĉe la venonta Kongreso. Ni proponas ke ĉiu Esperantisto, kiu ne povas mem ĉeesti la Kongreson, donu iomete da monhelpo al iu elektita Esperantisto en sia urbo aŭ regiono, kiu havos la libertempon por veni, kaj kiu volonte venos por reprezenti siajn najbarojn ĉe la Kongreso, dononte al ili formalan raporton, se nur ili ĉiuj iom helpos lin pri la elspezoj de la vojaĝo kaj de la loĝado en la kongresurbo.

Tuj grupigu vin, kaj elektu iun, kiu estos via reprezentanto, kaj kies elspezojn vi prenos almenaŭ parte sur vin. Memoru ke la Sesa Kongreso okazos en iu el la ĉefurboj de la mondo, antaŭ la okuloj de la registaro de Usono kaj de la ambasadoroj de la aliaj nacioj de la mondo. Se ni faras bonan impreson sur ĉi tiu registaro kaj la ambasadoroj, tio multege helpos al la Esperantista Afero. Se la Usona Registaro vidos klare ke Esperanto estas taŭga kaj praktika kaj ke Esperantistoj venis el ĉiuj partoj de la mondo por montri tian taŭgecon al Usono, tiam ni povos multe pli facile konvinki la Usonian Registaron ke ĝi akceptu kaj oficiale aprobu la Internacian Lingvon, kaj ke ĝi komencu mem uzi Esperanton, kiel oficialan internacian komunikilon. Estas grava devo de ĉiu Esperantisto en la mondo helpi en ĉi tio! Ĉu vi ne tuj komencas?

Vizitoj estos aranĝataj al la kongresbiblioteko, la «Blanka Domo», nacia kapitulo, Trezorejo, Stata Milita kaj Marmilita Konstruaĵoj, Muzeo, Smithsoniana Instituto, Gravur-kaj Preskonstruaĵo, Agrikultura Departamento, Poŝtoŝeĉejo, Monumento, Fiŝkomisio, k. t. p. Oni ankaŭ faros mallongajn ekskursojn, ne nur en la turistaj automobiloj tra la urbo mem, sed ankaŭ per boatoj, tramvojoj, k. t. p. al Mount Vernon. Kaskadoj de la Potomako, Chesapeake Beach, Marshall Hall (en lunluma riverekskurso, Arlington Nacia Tombejo, Rock Creek parko, Zoologia parko, k. t. p.

La Vojaĝo.—La Universala Esperantista Asocio afable konsentis aranĝi la detalojn de la vojaĝo de Eŭropo ĝis Nov-Jorko. Ĉiu, kiu intencas ĉeesti la kongreson, sin turnu al tiu Asocio (8 rue Bovy-Lysberg, Genevo, Svisujo) por informo pri biletoj, kosto, k. t. p. Oni devus tuj fari tion, ĉar estas

preskaŭ ĉiam necese aĉeti la ŝipbiletojn du aŭ tri monatojn antaŭ la foriro de la oceanŝipo. La veturado de Nov-Jorko ĝis Washington kaj reen ĝis Nov-Jorko ne kostos pli ol dek dolarojn (20 Sm.) Kredeble ni obtenas pli malgrandan prezon, se estos sufiĉe granda nombro da kongresanoj.

Loĝado.—La Organiza Komitato volonte faros aranĝojn por la kongresanoj pri loĝado, k. t. p. La hotelo «Arlington», kiu estas rekte trans la parko Lafayette kaj tre proksima de la «Blanka Domo», estos la konstruaĵo en kiu troviĝos la akceptejo, k. t. p., kaj en kies grandaj haloj okazos kelkaj el la kunsidoj de la Sesa. En ĉi tiu hotelo la specialaj prezoj al kongresanoj estos la jenaj:—

Loĝado sen manĝado (nomita «European Plan»):—Unu ĝis du dolaroj (du ĝis kvar spesmiloj) por unu tago por unupersona ĉambro; sama ĉambro kune kun ban-ĉambro, du ĝis tri dolaroj (kvar ĝis ses spesmiloj) por unu tago.

Loĝado kun manĝado (nomita «American Plan»):—Tri dolaroj (ses spesmiloj) por unu persono en unu ĉambro; kvin dolaroj (dek spesmiloj) por du personoj en unu ĉambro. Ban-ĉambro kostas unu dolaron (du spesmiloj) plu.

Kelkaj aliaj hoteloj donos pli malkaran prezon, sed ili ne estas tiel proksimaj de la kongresaj sidejoj. Sed la komitato povas aranĝi por loĝado kaj manĝado en bona hotelo po du dolaroj (kvar spesmiloj) por unutaga loĝado kaj manĝado.

Aldone, la komitato ankaŭ aranĝas por loĝado kaj manĝado en loĝejoj, pensioj, k. t. p. La komitato havos multajn ĉambrojn, bonajn kaj purajn, en sufiĉe bonaj lokoj, po kvar dolaroj (ok spesmiloj) por unu semajno, kaj ankaŭ unu aŭ kelkajn manĝejojn kie oni ricevos bonajn manĝojn po kvin dolaroj semajne. Kompreneble oni povas loĝi ĉe la «Arlington», aŭ alia hotelo, kaj manĝi aliloke.

Skribu al la komitato se vi volas antaŭaranĝojn pri loĝado, kaj skribu klare kaj plene kion vi volas. La komitato penos plenumi viajn volojn. Adresu la Sekretarion, S-ro Edwin C. Reed, Chamber of Commerce, Washington, D. C., Usono.

Kartoj, poŝtkartoj, kongresmarkoj.—La kongreskartoj, kiuj enlasos la posedanton en ĉiun oficialan kunsidon kaj feston de la SESA, estas nun aĉeteblaj de la Sekretario, en Washington, kaj ankaŭ ĉe la Centra Oficejo, 51, Rue de Clichy, Parizo. La prezo de ĉi tiuj kartoj estas kvin dolaroj (dek spesmiloj), el kiu la duono (kvin spesmiloj) estos redonata al ĉiu, kiu venos el alia kontinento ol Norda Ameriko.

La belaj kongresmarkoj estas nun aĉeteblaj po dudek kvin cendoj (duono da spesmilo) por cent markoj, afrankite. La serio de dek kvin poŝtkartoj, de Washington'aj, vidindaĵoj, (Esperante priskribitaj) kostas dudek kvin cendojn (duono da spesmilo).

KONDIĈOJ DE LA LITERATURA KONKURSO

1. Ĉiu verko devas esti originala. Nenia traduko estos akceptita.
2. Neniu manuskripto estos akceptita por pli ol unu konkurso.
3. Neniu manuskripto estos akceptita se ĝi jam estas plene aŭ parte publikigita antaŭ la disdonado de la premioj.
4. Se laŭ la opinio de la juĝantaro neniu sufiĉe bona manuskripto estas ricevata por iu konkurso la juĝantaro havos la rajton malakcepti ĉiun manuskripton kaj ne doni la premion. Ili redonos tiun premion al la donacinto.
5. Ĉiu premiita verko apartenos al la donacinto de la premio, dum unu jaro post la Sesa Kongreso, se la donacinto ne alie anoncas. Se la donacinto ne publikigis ĝin antaŭ la fino de tiu jaro, la verko tiam apartenas al la aŭtoro, kaj ne plu al la donacinto.

6. Post la Konkurso, la nepremiitaj manuskriptoj estos resendataj al tiuj aŭtoroj kiuj antaŭ la 1^a de oktobro, 1910, sendos la necesan monon por pagi la poŝton.

7. La verkoj devas esti skribitaj sur UNU FLANKO de la papero. Manuskriptoj skribmaŝine skribitaj ricevos la plej zorgan konsideradon. La juĝantaro rajtos tute ignori nelegeblajn manuskriptojn.

8. Sur ĉiu manuskripto devos esti skribita, krom la titolo, nur iu elektita pseŭdonimo de la aŭtoro. Fermite koverto, en kiun la aŭtoro metos sian nomon kaj plenan adreson, kaj sur kiu estas skribita nur la titolo de la temo kaj la pseŭdonimo de la aŭtoro, devos akompani ĉiun manuskripton. Oni povos ankaŭ laŭvole meti la resendpagon en tiun koverton.

9. Ĉiu manuskripto devos esti ricevata de la Konkursa Komitato ĉe la Ĉambro de Komerco, Washington, D. C., Usono, antaŭ la 1^a de julio 1910. La sola escepto estas, ke manuskriptoj juĝotaj de la «specialaj» juĝantoj (anstataŭ la Kongresa juĝantaro) devos esti sendataj rekte al tiuj juĝantoj. Sed la koverto enhavanta la nomon kaj adreson devos esti samtempe sendata al la Konkursa Komitato en Washington.

10. La juĝado estos farita de la Kongresa Juĝantaro, kaj ankaŭ de «Specialaj» juĝantoj. La Kongresa Juĝantaro konsistos el Esperantistoj zorge elektitaj de la Organiza Komitato, laŭ la propono de la konkursa Komitato.

«Specialaj» juĝantoj estas tiuj Esperantistoj, kiujn eble la donacintoj de premioj por verkoj pri pli malpli tecnikaj temoj petos doni sian servon. Donacintoj kiuj volas tiajn juĝantojn, devos antaŭe obteni la konsenton de la dezirataj juĝantoj, kaj anonci tion al la Konkursa Komitato, samtempe kun la temo kaj premio proponitaj. Se la temo kaj premio estas akceptitaj de la Konkursa Komitato, la speciala juĝanto (aŭ specialaj juĝantoj) estos akceptita, kaj ties decido estos plene aprobata de la Komitato. La «specialaj» juĝantoj sendos al la Komitato en Washington ĉiun ricevitan manuskripton kune kun la anonco pri sia decido.

11. La Konkursa Komitato donos la manuskriptojn al la kongresa Juĝantaro, kolektos ilin, faros liston de decidoj, kune kun la decidoj de «specialaj» juĝantoj, kaj fine malfermos la kovertojn kiuj enhavas la nomojn de la aŭtoroj, por fari ĉiun aranĝon pri la anoncado kaj la festo por la disdonado de premioj.

12. Neniu juĝanto partoprenos en Konkurso per kiu li mem estos unu el la juĝantaro.

TEMOJ KAJ PREMIOJ

La Organiza Komitato proponas la jenajn temojn kaj donacos medalojn al la premiitoj.

Universala frateco.—Prozaĵo de 1000-2000 vortoj. Poezio de 20-50 linioj.

Rakonto (prozaĵo de 2500-3000 vortoj).

Rakonto (prozaĵo de 2500-3000 vortoj) verkita de junulo aŭ junulino inter la aĝoj de 15-20 jaroj.

ALIAJ TEMOJ KAJ PREMIOJ

La simileco inter Zamenhof kaj Lincoln.—La verkoj de Zamenhof, lukse binditaj.

La utileco de Esperanto por Blinduloj.—«Braille», libroj (speciala juĝanto, Prof. Cart, 33 Rue Lacépède, Parizo, Francujo.)

Traktato pri la biblio.—Proponata de Ulysses G. B. Piercc, Kapelano de la Usona Senato.—Libro de Sintezaj Lekcioj pri la Biblio, aranĝita de la Kapelano mem, kun antaŭparolo de Edward E. Hale, fama antaŭa Senatkapelano. En la libron estas metita aŭtograflero de D-ro Hale.

La utileco de Esperanto en Komerco.—Proponata de la Washington'a Ĉambro de Komerco.—Arta objekto je la valoro de dudek spesmiloj.

DIVERSAJ SCIIGOJ

Elkskurso tra la haveno el Barcelono.—Afable invitita de Sinjoro B. Anglada, kasisto de «Espero Kataluna», tiu ĉi Societo organizis por la 24^a de aprilo kaj per la vaporŝipetoj nomataj Hirundoj, ekskurson tra la haveno kies ĉefa celo estis viziti la novajn digojn, kiujn oni nun konstruas.

La horo antaŭfiksita por kunveni kaj enŝipiĝi estis la 9^a matene, sed tial ke en la ekskurso partoprenis multaj fraŭlinoj, oni ne atingis la sufiĉan nombron da ekskursontojn ĝis la 9^a kaj 1^a. Tamen mi devas diri ke dank' al tio multaj viroj povis enŝipiĝi, ĉar ili ankaŭ multe malfruiĝis, kaj inter tiuj estis mi.

Enirinte ĉiuj en la vaporŝipeto, kiu havis sur la koverto nian verdan flagon, oni jam ne aŭdis parolon en kataluna lingvo; ni estis en mara Esperantujo. Kaj estis ridiga aŭdi la strangaĵojn kiujn ni diris por sprimi la sencon de teknika mara vorto malmulte uzata kaj pro tio preskaŭ de neniu sciata. Feliĉe, apud ni estis ekskursano kies nomon mi ne diras por ne ofendi lian modestecon, sed ni prave povus nomi lin vivanta leksikono, kiu tre ofte eliris nin el niaj embarasoj dirante al ni la ĝustan esperantan vorton.

Parolante kaj ridante, ĉar kie estas junuloj la ridoj ĉiam sin aŭdigas, ni eliris el la malnova haveno kaj komencis vidi la grandegajn ŝtonojn per kiuj oni konstruas la pligrandigon de la haveno.

Atabla samideanino sciigis nin pri la pezo de tiuj ŝtonoj. Sed nun mia memoro, kiel ĉiam malsukcesas kaj el tiu sciigo mi nur memoras ke la vorto *kilogramoj* sekvis al numero kuometita per multaj 0.

Ni enŝipiĝis sur unu el la malnovaj digoj kaj tie la fotografistoj povis fari kelkajn fotografaĵojn. Ni promenis ĉien por movigi niajn krurojn, kiuj estis iom lacaj pro la longa nemovebleco, kaj post malmulte da tempo, ni ree enŝipiĝis. Sed okazis ke la vaporŝipeto ne povis sin meti en tuta konvena loko apud la enŝipejo (la mara movo estis iom grava, laŭ mi aŭdis diri) kaj por povi eniri en la Hirundon, ni devis salti de tero al la balustrado, de tie al benko kaj fine ni saltis en la ŝipon. Tio ne estis tre malfacila apero, sed por la fraŭlinoj iom timemaj la afero multe komplikiĝis. Kaj la konsiloj pluvis sur ilin: Fraŭlino; apogu vian dekstran manon sur la koverto!—Fraŭlino; loku bone la maldekstran piedon!... El tio rezultis ke ili faris ĉion, krom kion oni diris al ili. Fine la afero finiĝis kaj la ŝipeto sin direktis rekte al la Placo de la Paco.

Tre proksime al tie kaj por fini la ekskurson, oni kantis «La Esperon», sed mi ne scias ĉu estis pro la malakordado de la kantantoj, ke la ĉielo, kiu dum la ekskurso pleniĝis per nuboj, salutis nin per pluvo sufiĉe grava por atingi nian atenton.

Rapidaj manprenoj, rapidaj salutoj kaj rapidaj kuradoj par supreniri en la tramveturilojn; tiel estis la fino de la ekskurso.—EPONO.

**

Statistiko por Esperanto.—En Germanujo nia afero kreskas ĉiutage, la germanaj registaroj komencas interesiĝi pri Esperanto, sed ili postulas precizan statistikon, ili ne nur volas scii, kiom da grupoj ekzistas, sed ankaŭ kiom da grupanoj. Tial estas necese aranĝi kiel eble plej rapide statistikon. La eldonejo de la fama konata ilustrita revuo *Universo* afable donacis la sumon por ebligi tion. Oni forsendis pli ol 2000 demandkartojn al ĉiuj grupoj de la tuta mondo. Estas necese, ke ĉiuj grupoj respondu kiel eble plej rapide. Grupoj kiuj ne ricevis demandkarton, bonvolu tuj skribi al D-ro Schramm en Dresden 20, por ke li povu sendi ĝin. La afero estas tiel grava por ni, ke neniu grupo devas manki en la statistiko.

**

Ekskurso tra la Kasteloj da Centra Francujo, organizita de la Esperantista Grupo de Blois sub la aŭspicioj de U. E. A. — Blois, la 10-an de Majo 1910. Estimataj Gesamideanoj, «Esperanto» bonvolis konigi per kelkaj artikoloj la «landon de la kasteloj». Tiuj kasteloj estas vidindaj ne nur pro la memoraĵoj de la nacia historio, sed ankaŭ pro la memoraĵoj de la arto.

Interesinde ŝajnis al la Esperantista Grupo de Blois vizitigi tiun landon, kaj, sub la aŭspicio de U. E. A. kaj la helpo de la grupoj de Paris, Orléans, Tours, Versailles, ĝi provas organizi vojaĝon tra tiu bela lando, apud Loire.

Jen la provizora programo:

15-an de Aŭgusto: Matene, kunveno de la aliĝintoj, vizito de Parizo.

16-an: Daŭrigo de la vizito de Parizo.

17-an: Matene, foriro al Orléans; vizito de la urbo; ekskurso al la bordoj de Loiret.

18-an: Matene, foriro al Blois; vizito de la urbo; ekskurso al la kastelo de Chambord.

19-an: Vizito de la kastelo de Blois; ekskurso al la kastelo de Chaumont.

20-an: Matene, foriro al Amboise; vizito de la kastelo; foriro al Tours; vizito de la urbo.

21-an: Ekskurso al kastelo de Chenonceaux; foriro al Parizo.

22-an: Vizito de la kastelo de Versailles kaj de Trianon.—Disiĝo.

La prezo estas proksimume 72 Sm: tri manĝoj ĉiutage, vojaĝoj, veturiloj, trinkmonoj, interpretoj, hoteloj.

La definitiva programo estos sendita al la aliĝintoj en Julio.

La vojaĝo okazos nur se la jena programo kunigos almenaŭ 30 aliĝintojn pagantajn.

**

La ŝtato Marilando oficiale aprobas Esperanton. — Je la 11^a aprilo, 1910. Lia Moŝto Austin L. Crothers, Guberniestro de Marilando, subskribis la legoprojekton, kiu permesas la instruadon de Esperanto en la lernejoj publikaj de tiu ŝtato.

Tio ĉi estas la unua okazo en Usono, kiam iu ŝtato oficiale metas Esperanton en sian leĝaron. Tial sendube estos interese al niaj legantoj havi resumon de tiu ĉi legoprojekto, kiu nun fariĝis efektiva leĝo, kune kun mallonga redaktaĵo pri la tiel progresema ŝtato Marilando.

La legoprojekto estis enkondukata de la jena antaŭparolo:

«Vidante ke la internacia Lingvo Esperanto faras efektivan progreson en multaj el la progresemaĵoj de la mondo, kaj estas aprobita de kelkaj internaciaj kongresoj; kaj

»Vidante ke tiu ĉi lingvo kontentigas la longe sentitan bezonon por simpligata sed supera komunikilo inter la nacioj, ne elpuŝante naciajn lingvojn, sed provizanta duan lingvon al ĉiuj; tial

»Fariĝu leĝo de la Ĝenerala Konsilantaro de Marilando ke en ĉiu distrikta lernejo estu instruataj» (jen estas nomataj la ordinaraĵoj de lernado) «kaj la elementoj de agrikultura scienco kaj la Internacia Lingvo Esperanto, povas, laŭ la kontrolo de la Ŝtata Konsilantaro pri Edukado, esti aldonitaj al la fakoj, kiuj devas esti instruataj en la Stataj Normalaj Lernejoj, kaj en la lernejoj publikaj de la diversaj regionoj de la ŝtato.»

La konvinkado de la kongresanoj, ke ili devus fari tian leĝon, estas precipe farita de S-ro James L. Smiley, en Anapoliso, helpite de S-ro George Moss, en la sama urbo, kaj de Profesoro W. J. Spillman, kaj S-ro Karl F. Kellerman, de la Usona Agrikultura departemento en Washington, kaj de S-ro Edwin C. Roed, sekretario de la Esperantista Asocio de Norda Ameriko kaj de la Sesa Kongreso.

**

Esperanto-Kongreso en Kopenhago. — Laŭ admono de pluraj en kaj eksterlandaj Esperanto-societoj. Centra Dana Esperantista Ligo okazigos Esperanto-Kongreson en Kopenhago fine de la monato Aŭgusto.

Tiu-ĉi Kongreso certe havos grandan signifon por nia afero, tial ke samtempe okazos, ankaŭ en Kopenhago la granda internacia laborista Kongreso, kaj unu el la punktoj de la tagordo de tiu Kongreso estas: enkonduko de internacia lingvo.

La kongresa komitato jam havas prete provizoran programon.

La Kongreso daŭros tri tagojn, kaj la prezo de lo kongreskarto, kiu rajtigas partopreni ĉiujn festojn, aŭtomobil-veturadon kaj vaporŝip-ekskursion, estas fiksita je 3¹/₂ Sm. Oni klopodos por havigi al la partoprenantoj, kiuj tion deziras, kaj kiuj ĝustatempe sendas sian aliĝilon, malkaran loĝejon.

La partoprenantoj kiel eble plej baldaŭ devas anonci sian partoprenon al la sekretario de la kongresa komitato Sinjoro ĵurnalisto J. Tof, Thorvaldsensvej 6 III; Kopenhago; samtempe sendante la monon (3¹/₂ Sm.), post kio la kongreskarto tuj estos sendata.

**

En la venonta numero, ni raportos pri la Unua Kataluna Kongreso Esperantista ĵus okazinta en Sabadell. Ni ne povas tion fari en tiu ĉi numero pro manko da tempo.

GAZETARO ESPERANTISTA

De **Eho Esperantista.**—Berlino S. W. II Des-sanerstrasse.

«Brila negoco. Amatoro de pentraĵoj, kiu timis sian edzinon, faris sekrete siajn aĉetojn kaj uzis ĉiajn ruzojn kaj mensogojn por enkonduki ĉerverkajn en sian kolekton. Ian tagon li akiris por 15000 spesmiloj iun admirindan beladroidon, kaj reirante hejmen kun sia bildo li jene monologis: 15000 spesmiloj, mi havos teruran scenon. Mi diros la duonon. Jes 7000... tio iros. Ha, mi povas ankaŭ diri 4000... Kiam li venis domon, li heroe diris 3000. Lia edzino grimacis maldolce; ŝi tamen rekvietigis kaj alkreĉis mem la pentraĵon.

Li poste forvojaĝis kelkajn tagojn kaj kiam revenis, li trovis sian edzinon radiantanta de feliĉo: Ĉu vi scias? ŝi diris; en via foresto mi faris brilan negocon. Mi vendis vian bildon por 4500 spesmiloj!..

Tio faras profiton da 1500 spesmiloj! Nia brava artamiko kredis, ke li tuj svenos.»

«Punita avareco.—La konata bankisto F. akiris sian kolosan riĉecon ne nur per feliĉa spekulado, sed ankaŭ per sia spareco, kiu tre proksimiĝis al avareco. Foje oni ludis al li iun bonan trompon. Kiam la bankisto estis ankoraŭ novico, unu nekonato lin aliris kun jenaj vortoj: Invitu min al tagmanĝo kaj mi diros ion, kio pli valoras por vi ol 100 taleroj. La avaro akceptis la proponon kaj regalis plej bone la nekonaton. Ĉi tiu abunde manĝis kaj trinkis, kaj kiam fine lia gastiganto lin deman-

dis pri lia informo, li donis ĉi tiun respondon: Por vi 200 taleroj certe valoras pli ol 100.»

«Ekstreme kurioza.—Sinjoro P. en Berlino havis du multkostajn ĉemizbutonojn, sur kiuj troviĝis malgranda muŝeto el polurita ŝtalo. La muŝo estis tiel iluzie laborita, ke ofte homoj kun li parolantaj volis ĝin forĉasi. Iam unu el ambaŭ butonoj malaperis. Sinjoro P. silentis, kvakam li havis sian suspekton. Sed kiam baldaŭ poste la dua ankaŭ perdiĝis, la maljuna servistino estis akuzata pro la ŝtalo kaj forpelata el la domo. Ne longe poste Sinjorino P. ekvidis en angulo aranean teksaĵon, kaj tiam ŝi volis ĝin forigi, jen tiam elfalis ambaŭ butonoj. Dika araneo, trompita de la simileco, estis ilin portinta en sian reton.»

**

De **Belga Esperantisto.**—Anvers 49, Kleine Beerstraat (Rue de la Porte Ourse).

Liaj haroj.—S-ino Shobs ĉiam portas medallionon, enhavantan harbutklon de sia edzo. Sed tiu lasta, maljuniĝante fariĝis tute sen hara.

—Ve, li ĝemis. Mi ja havas ankoraŭ kelkajn harojn, sed... estas mia edzino kiu portas ilin.»

**

De **Ruslanda Esperantisto.**—Rusujo, Petesburgo, Neoskij 40.

«Nova fervoja takso.—Apud fervoja biletkaso staras unu sinjorino kun filo kaj servistino.

—Donu al ni du kaj duonon biletojn de tria klaso ĝis N., petas sinjorino, sin adresante a kasisto.

—Por kiu do la duonbileton? demandis la kasisto, ĉirkaŭrigardante la ĉeestantaron.

—Por ĉi tiu mia malgranda filo.

—Ha! via filo estas sufiĉe granda. Li portas jam longan pantalonon kaj devas preni la plenan bileton.

Ha! Se vi taksas laŭ tia nova takso, tiam donu al mia filo plenan bileton, al mi persone la duonon, kaj mia servistino povas veturi eĉ sen bileto.

**

De **The Australian Esperantist.**—Benall, Viktorio, Aŭstralio.

•Du araneoj loĝis en preĝejo. Promenante unu tagon, ili okaze renkontiĝis. Kiel vi statas? diris unu al la alia. Ho, nur modere, estas la respondo. Dimandojn mi ne sentas mia tre komforta. Mi loĝas en la katedro sub la kusenon kaj tiun tagon la pastro iras pugnebatas la libron, kaj mi devas zorge retiri min, por ke li ne frapu min. Li batas tiel forte, ke mi timas, ke unu tagon li dispremos min. —Ho, venu do loĝi kun mi, diris la alia. Oni neniam maltrankviligas min; mi vivas ĉiam trankvile kaj komforte de unu ĝis alia jarfino. —Ĉu efektive? kaj kie vi loĝas? —Ho, mi loĝas en la almoza skatoleteto, estis la respondo.»

**

De **The British Esperantist.**—133, 136, High Holborn, London, W. C.

•ORIENTAJ FABELOJ

Esperantigis Jotojo Travancore, Hindujo.

Unu avarulo diris al amiko sia: Mi nun posedas mil rupiojn, kiujn mi enterigos ekster la urbo, kaj tiun ĉi sekreton mi diros al neniŭ krom vi. Ili kune eliris el la urbo kaj enterigis la monon sub arbo. Post kelke da tagoj, la avarulo sola iris al la arbo, sed trovis nenian signon pri sia mono: Li diris al si: Krom tiu amiko, neniŭ tion forigis; sed se mi lin demandas, li neniam konfesos. Li iris tial al lia domo kaj diris: «Amiko mia, multe da mono mi antaŭnelonge ricevis, kiun mi volas kuŝi sur la sama loko. Se vi venos morgaŭ, ni iros kune.» La amiko, avidante tiun ĉi grandan sumon, remetis la alian monon kaj la avarulo la morgaŭnan tagon iris tien sola, kaj trovis sian monon. Li goĝegis pro sia elpensajo kaj neniam poste metis loman de konfido en amikoj.

**

De **Svisa Espero.**—10, Rue de la Bourse. —Genevo.

«Proberboj mokemaj.—Mi multfoje demandis min: kia estas la origino de la naciaj proverboj mokemaj?»

Estus kuriozaĵo kunigi ĉiujn tiujn proverbojn, kaj ankoraŭ pli kurioza kunigi ĉiujn respondojn al la antaŭa demando.

Ekzemple: kiam iu friponas en ludo, oni diras ĉie pri li: Tiu estas Greko (c'est un grec).

Kial? Ĉu tia popolo loman tiel belartema havas nun la «arton» por trompi ludistaron?

Ni diras en Hispanujo; «jaluza kiel Turko», kaj niaj francaj amikoj diras: «jaluza kiel Hispano». Tio estas, por francoj jaluza estas Hispanlando, kaj por Hispanoj estas Turkujo.

La simpatiaj Poloj estas drinkemaj... almenaŭ tion diras la Franca esprimo li estas drinkinta kiel Polo.—Kontraŭe, por Hispano havi turkinon, signifas esti drinkinta.

La ŝuldantoj, an pli bone, la ŝuldistoj diras en Hispanujo pri sia kreditoraro: ili estas miaj Angloj, kaj en Francujo: ili estas miaj Judoj.

En Parizo, oni diras ofte: li estas kiel Normando, ĉar diras nek jes nek ne. Do, li estas nesincera.

Kiam iu estas nekredinda, oni diras Hispano al li: Vi estas Turko, do mi ne kredas al vi. Kontraŭe, la ĥinoj estas tre trompitemaj... laŭ la Hispana proverbo oni trompis min kiel Ĥinon.

Zaragozanoj estas famaj pro sia troobstineco: tie estis vera dum la famaj sieĝoj antaŭ unu jarcento. Kuakeroj estas famaj pro sia severeco; Hispanaj Galicianoj pro sia avareco; Iroj, pro sia idioteco. Sendube tiaj famoj estas nopravaj multfoje.

Sed ĉiu lingvo havas proverbojn por moki al homoj alilandaj. Nur Esperanto estas nekalamnianta lingvo. Kvankam ĝi ne havus aliajn perfektajojn, nur pro tio ĝi estas pli bona ol ceteraj lingvoj; kvankam ne estus aliaj kialoj, tio ĉi sufiĉas por ke ĉiu homaromanto estu entuziasta Esperantisto.—Fernando Redondo.»

**

De **La Spiritulo.**—Könerstrato, 31. Leipzig. (Germanujo).

«En la juĝejo—Juĝisto: Antaŭe vi ŝtelis 100 lirojn kaj nun 50; vi ne estas koroktebla.

Akuzito: Sed kiel? Ĉu mi ne estas pli bonniginta je ja procentoj?»

«Serca respondo.—Fermu la fenestron, ekstere estas tre malvarme! Ĉu vi pensas, ke tiam ekstere estos pli varme?»

«Ĝentileco!—Mi petas, atentu bone, sinjoro komercisto, ĉar mi havas nun piedon pli grandan.

Komercisto (ĝentile): —Ho kontraŭe, fraŭlino, al mi saĝnas ke vi havas unu piedon pli malgrandan.

A. BARDAJI.

JARLIBRO DE LA KATALUNA ESPERANTISTARO

Societat PACO KAJ AMO, de Palafrugell

1	Arcadi Girona, Rajola, 11.	42	Carme Gallart, Pi i Margall, 13.
2	Franç. Sagrera, Independencia, 11.	43	Concepció Ferrer, Sant Martí.
3	Josep Bruguera, Sagunto, 20.	44	Caterina Rocas, Sol, 21.
4	Joan Quintana, Casas Noves, 1.	45	Consolació Vicéns, Sant Antoni, 7.
5	Josep Riús, Palamos, 68.	46	Catarina Martí, Plaça den Bou, 4.
6	Gertrudis Regincos, Pedró Petit, 6.	47	Carme Avellí, Rafinos, 26.
7	Dolors Pagés, Sant Sebastià	48	Ezequiel Marató, Valls, 8.
8	Lluïsa Jofre, Pedró Petit, 8.	49	Francisca Deulofeu, Pals, 25.
9	Enriqueta Noguera, Cavallers, 20.	50	Gertrudis Alberti, Cavallers, 10.
10	Lluïsa Rocas, Sol, 21.	51	Herminda Massoni, Albalat.
11	Lluïsa Rumañach, Independencia, 19.	52	Isabel Gallart, Pi i Margall, 13.
12	Josep Boix, Plaça Nova, 5.	53	Joselina Carreras, Pi i Margall, 14.
13	Juli Llavina, Pedró Gran.	54	Laura Catalá, Pi i Margall, 32.
14	Josep Marqués, Pals.	55	Laura Matas.
15	Josep Aliu, Pi i Margall, 3.	56	Isabel Carreras, Garriga.
16	Lluïsa Passarrius, Sant Josep, 4.	57	Elionor Roch, Sol, 1.
17	Aveli Ribas, Sant Josep, 6.	58	Maria Dalmau, Aninas.
18	Ildefons Laviña, P. ^a Constitució, 7.	59	Maria Simon, Sant Ramon, 1.
19	Tomás Mascort, San Sebastià, 39.	60	Maria Bruguera.
20	Francisco Ferrer, Pagés i Morató.	61	Maria Brugués, Cavallers, 7.
21	Pere Oliveras, Valls.	62	Maria Mestres, Tarongeta.
22	August Farras, Plaça Nova, 1.	63	Maria Garriga, Sant Antoni, 16.
23	Sabi Gallart, Plaça Nova, 3.	64	Maria Paredas, Sant Martí, 13.
24	Florenci Gispert, Garriga, 12.	65	Maria Gispert, Torre dels Moros, 4.
25	Arnand Bruguera, Hostal den Pau 22	66	Maria Sebat, Cavallers.
26	Pere Solés, Pont.	67	Maria Jenoer.
27	Benet Maria, Tarongeta.	68	Maria Bonany, Palamos, 3.
28	Miquel Pujol, Pals, 15.	69	Maria Mascort, Palamos.
29	Joan Clara, Palamos, 2.	70	Maria Martí, Plaça den Bou, 4.
30	Joaquim Morató, Valls, 8.	71	Pilar Simon.
31	Josep Silvestre.	72	Josepa Vilaseca, Pedro Gran, 12.
32	Daniel Zuriñach, Progres, 7.	73	Pilar Denlofeu, Tarongeta, 32.
33	Joan Riús, Casas Noves, 31.	74	Raimunda Aulestia, San Sebastián, 17.
34	Marti Casanoves, Progres, 15.	75	Rosa Riús, Cavallers, 10.
35	Miquel Gasot, Tarongeta, 36.	76	Raimona Pujol.
36	Enric Prats, Casas Noves.	77	Salvadora Esteve, Casas Noves, 2.
37	Climent Millás.	78	Teresa Morató, Valls, 8.
38	Lluïsa Saballs, Sant Josep, 7.	79	Teresa Dachis, Sant Antoni, 4.
39	Miquel Alsina, Girona, 4.	80	Teresa Gallart Mayola, Plaça Nova, 3.
40	Antonia Paredas, Sant Martí, 13.	81	Teresa Gallart Ferrer, Sagunto, 28.
41	Angela Zuriñach, Progres, 7.	82	Teresa Cantó

SOLVO de la

AKROSTIM SARMO

A-MO-MI-A-KO

1.^a 2.^a 3.^a 4.^a 5.^a

A-NI-MO

KO-IZO

KO-MI

A-MO

KO-KO